

# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin Vol 48, N° 1 (2009/1)



**Ĉu vi festos la 40-an datrevenon de NASK?** (pĝ. 3)

**Ankaŭ ĉi-numere:** Nova traduk-defio • Nova rubriko pri astronomio • Recenzo: Lidia Raporto pri Ago-Semajno • Kial oni brosas per broso sed kombas per kombilo • kaj pli...

# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktisto • *Editor:* Hoss FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA  
✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial  
deadline for the upcoming issue:*

**la 20-a de Marto 2009**

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla lingvo. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j), la loko kaj dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĵuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

*We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint material from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*

★★★

Centra Oficejo • *Central Office of Esperanto-USA*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA  
☎ 510.653.0998; 2510.653.1468  
✉ info@esperanto-usa.org  
http://esperanto-usa.org

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS


**Prezidanto • President:** Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • Vice President:** Tim WESTOVER

**Sekretario • Secretary:** Julie SPICKLER

**Kasisto • Treasurer:** Anna BENNETT

**Aliaj estraranoj • Other board members:** Joel AMIS, Jenja AMIS, Trevor ANDREWS, Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Ros HARUO, Christopher ZERVIC



## Hoss FIROOZANIA

...diligente redaktas vian bultenon de sub dika neĝtavolo en nord-orienta Usono. Ajnaj tajperaroj rezultas sole de man-tremetoj pro malvarmo. Kiel ĉiam, viaj kontribuoj estas bonvenaj—aparte tiuj skribitaj dorsflanke de flugbileto al Havajo aŭ Florido, ekzemple.

**bulteno@esperanto-usa.org**

## Duone granda, sed duoble dika

Kio okazis al la bulteno?!

Kiel vi jam sendube rimarkas, la paĝoj estas malpli altaj kaj larĝaj ol kutime. Efektive, ni nun uzas la internacian formaton "A5" anstataŭ la kutima nordamerika "Letter." La kialoj estas multaj (kaj burokrate tedaj) sed ĉefe temas pri pli facila presado kaj sendado: ekzemple, afranki tiun ĉi malgrandan formaton estas multe malpli koste ol afranki la pli grandan, eĉ se la pezo multobliĝus.

Kaj kiel vi ankaŭ sendube rimarkas, la bulteno nun multe pli dikas—simile al multaj el ni post la feriaj festenoj, ĉu ne? Entute, la enhavo-kvanto restas tiel granda kiel antaŭe, aŭ eĉ iom pli granda.

Mi dankas al ĉiuj pro la kuraĝigaj notoj kiuj lastatempe alvenis ĉe la redakcio, kaj kompreneble mi daŭre petas viajn reagojn kaj konsilojn, aparte pri la novaj rubrikoj. ★

## Hazarda Esperanto



*Supozeble tiu ĉi ŝvabrilo estas multe pli utila ol la marko "Malbona"...*



## Teksasanoj festis Z-tagon

Ni havis Esperantan naskiĝtagan feston por Doktoro ZAMENHOF ĉe nia domo. Estis bela tempo por manĝi iom formale, prezenti informojn pri li denove al iuj el ni kaj unufoje al aliaj kiuj estas komencantoj, ĝui Esperantajn ŝercojn, kaj kanti Esperante. Ankaŭ ni malfermis nian privatan librejojn al la vizitantoj, kiuj rajtis elprunti librojn kaj KD-ojn laŭ prefero, kiel el publika biblioteko. (Foto de Ron WOLF).

—Elizabeto DORCAS

## Korespondi deziras

**Ani MIHSOT <lin.art@abv.bg>**. Bulgara s-ino 65 jaraĝa, universitata profesoro en Sofio deziras korespondi kun s-ro 65-80 jaraĝa por amikeco. Mi scias ankaŭ la hispanan, la rusan kaj kompreneble la bulgaran lingvon.

**Koresponda Servo, Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanujo.** Por korespondi kun japanoj. Bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn.

## Nova retejo kaj podkasto por soleni 40-an jaron de NASK

De la 29-a de Junio ĝis la 17-a de Julio, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) festos sian 40-an jaron en bela apudmara San-Diego. La kursojn ĉi-jare gvidos Spomenka STIMEČ, unu el la plej elstaraj vivantaj verkistoj en Esperanto, Paul GUBBINS, eminenta dramaturgo kaj ĵurnalisto, kaj Lee MILLER, konata usona pedagogo.

Por kuncelebri la datrevenon venos pluraj gastprelegantoj. Ĝis nun konfirmitaj estas Humphrey TONKIN kaj Mark FETTES; aliajn oni baldaŭ anoncos. Okazos ankaŭ video-konversacioj kaj intervjuoj kun instruistoj kaj lernantoj el antaŭaj jaroj kaj el diversaj landoj.

NASK estas unika evento en Esperantujo. Ĝi proponas oficialajn universitatajn kursojn malfermitajn al la tutmonda esperantistaro, sendepende de antaŭa universitata studo. Cetere, ĝi proponas tri-semajnan loĝadon en plene Esperanta medio: bela kaj moderne ekipita apartamentaro, kie ĉiutage estas diversaj eventoj, kaj distraĵoj kaj klerigaj.

Belan kaj informplenan retejon por NASK originale konstruis partopreninto Bob RUSSELL, kaj por soleni la 40-an datrevenon oni daŭre konstruas sur tiun fundamenton, aldonante novan aspekton kaj eĉ podkaston. Regule dum la printempo aperos novaj programoj kun son-registraĵoj el la pasintjara kursaro: en la retejo mem aŭ per podkast-ludilo kiel *iTunes* oni povos aŭskulti prelegojn, prezentojn, kantojn, ktp. Se vi interesiĝas pri NASK (aŭ se vi *re-interesiĝas!*) ne pre vizitu la retejon, ĉe:

<http://esperanto.org/nask>

## Renkontu najbaron: Steven CYBULSKI

*Jen ni inaŭguras novan serion de intervjuoj kun konindaj—sed eble ne sufiĉe bone konataj—esperantistoj el Usono. La celo estas renkontigi vin kun viaj samlandaj najbaroj kiuj uzas la lingvon en novaj, unikaj, aŭ alimaniere interesaj projektoj.*

*Unue ni intervjuas s-ron Steĉjo CYBULSKI, bakalaŭra studento ĉe la Universitato de Roĉestro, Novjorkio. Li eklernis Esperanton antaŭ nur unu jaro, kaj lastatempe li uzis la lingvon en siaj universitataj studoj.*

—Kion vi nun studas ĉe la universitato?

Precipe verkadon, literaturon, kaj religion. Tamen, ĉiujare la Universitato de Roĉestro permesas al kelkaj studentoj resti dum senpaga kvina jaro por studi ion, kio ne rilatas al iliaj ĉeffakoj. Mi estas unu el tiuj studentoj, kaj mi studas la japanan lingvon kaj la historion kaj kulturon de Japanujo.

—Krom Esperanto, kio estas viaj ŝatokupoj?

Mi tre ŝatas ĵongli, kaj povas ĵongli (aŭ, verdire, ĵonglaĉi) per sep pilkoj. Krome, plaĉas al mi ludi la gitaron.

—Kiel vi eklernis Esperanton, kaj kiam?

Mi eklernis Esperanton en Februaro de 2008. Unue, mi lernis per kelkaj metodoj samtempe: mi partoprenis kurson, kaj uzis la rimedojn ĉe lernu.net, kaj faris la lecionojn el la lernolibro de David RICHARDSON, *Esperanto: Learning and Using the International Language*. Post tio, mi iris al Kalifornio por studi la lingvon ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK).



Ricevante diplomon ĉe NASK 2008.

Foto de Meja JUNA.

—Kvankam multaj homoj interesiĝas pri la ideo de internacia lingvo, malmultaj vere dediĉas sin al profunda lernado. Kial vi decidis serioze studi Esperanton?

Mi ekstudis Esperanton pro multaj kialoj: ĉar mi volas vojaĝi, ĉar mi esperis ke la lernado de Esperanto helpus al mi lerni aliajn lingvojn, kaj tiel plu. Tamen, unu sperto ŝajnas al mi aparte menciinda. Dum la aŭtuna semestro de 2007, mi partoprenis kurson pri artefaritaj lingvoj. Ni lernis pri multaj lingvoj, inkluzive Esperanton. Plaĉis al mi la ideo de Esperanto, sed tio ne sufiĉis por igi min ekstudi la lingvon.

Tamen, je la fino de la semestro, brazila esperantisto kiu estis vojaĝanta en Usono vizitis la klason. Li parolis en Esperanto pri siaj spertoj, dum iu interpretis. Li diris al ni pri la multaj fojoj kiam lia scio de Esperanto multe helpis lin, kaj pri aliaj fojoj kiam tiu scio povigis lin helpi al aliaj homoj. Liaj rakontoj tre interesis min, kaj mi trovis la lingvon tre bela.

Antaŭ tiu tago, mi jam aŭdis ke Esperanto estas same uzebla kiel aliaj lingvoj, sed tion mi ne povis tute kredi sen pruvo; mi ankoraŭ ne aŭdis pli ol kelkajn frazojn en la lingvo. Tiun tagon, mi ricevis la bezonatan pruvon, kaj mi ekpensis, ke eble mi studu Esperanton.

**—Nu, kiel vi planas uzi vian novan lingvoscion?**

Nu, unue mi volas perfektigi (aŭ almenaŭ plibonigi) tiun lingvoscion. Ĉi-jare mi intencas finlegi PMEG-on. Krome, mi planas legi esperantan literaturon, korespondi kun miaj esperantistaj amikoj, verki iomete en Esperanto, kaj traduki kaj anglen kaj esperanten. Iun tagon, mi tre volas vojaĝi kaj uzi la Pasportan Servon.

**—Vi lastatempe utiligis Esperanton en viaj universitataj studoj, ĉu ne? Kiel?**

Jes, mi partoprenis kurson pri la tradukado, kaj tradukis anglen el Esperanto. Mi tradukis “La Metropolo Malsatas” kaj “Kiel Mihok Instruis Angle” de Julio BAGHY.

**—Kial vi elektis novelojn de BAGHY?**

Nu, estis kelkaj kialoj. Plaĉis al mi ke la noveloj malsimilas unu al la alia kaj stile kaj teme, ĉar mi pensis, ke estus bone montri la diversajn kapablojn de unu aŭtoro. Mi volis traduki ion, kio estis verkita de aŭtoro kiu ne estis denaska parolanto de la angla, ĉar mi pensis ke estus interesa defio angligi verkojn kiuj ne estis influitaj de la pensmaniero de anglalingvano. Fine, kaj eble plej grave, la noveloj estis du el la unuaj verkoj en Esperanto kiujn mi komprenis kaj ĝuis.

Mi legis ie ke BAGHY evitis uzi neologismojn. Mi ne opinas, ke la uzo de neologismoj ĉiam estas evitenda aŭ evitinda—antaŭ ne-

longe mi legis kaj ĝuis la sekretajn sonetojn de Peter PENETER, kaj tiuj poemoj enhavis multajn, ni diru, “interesajn” neologismojn—sed la emo de BAGHY ne uzi neologismojn certe faciligas la legadon de liaj verkoj, kaj multe helpas al nova esperantisto.

**—Ĉu viaj tradukoj haveblas ie en la reto? Estus interese legi ilin.**

La tradukoj ankoraŭ ne haveblas, kaj mi pensas ke ili restu tiel dum iom da tempo. Laŭ mi, ili ankoraŭ plibonigeblas, sed mi ankoraŭ ne estas sufiĉe lerta tradukanto por fari la necesajn ŝanĝojn. Kiam la tradukoj estas tiel bonaj, kiel mi pensas ili povas esti, eble mi aŭdos ilin ie en la Interreto.

**—Laŭ vi, kio estas plej malfacila en tradukado?**

Ŝajnas al mi ke tio dependas de la teksto, kiu oni volas traduki. Kiam mi tradukis “La Metropolo Malsatas,” mi trovis la dialogon terure malfacile tradukebla; virino en la novelo parolas iomete neformale, kaj mi ne povis bone angligi tiun neformalecon.

Kiam mi tradukis “Kiel Mihok Instruis Angle,” la plej malfacila parto estis traduki, ne simple vortojn, sed kulturon. Esperanta kulturo ludas gravan rolon en la novelo, kaj do en mia traduko mi devis klopodi klarigi tiun kulturon al legantoj, kiuj eble eĉ ne scias ke tiu kulturo ekzistas.

**—Kion vi planas fari post la diplomiĝo?**

Mi esperas transloĝiĝi al Kalifornio kaj trovi laboron. Post kelkaj jaroj, mi volas komenci studi por fariĝi instruisto ĉe universitato. Krome, mi planas verki kaj legi, kaj mi tre volas daŭrigi mian studon de Esperanto kaj la japana kaj eble ekstudi aliajn lingvojn. ★



## En la ĉielo ĉi-monate



Por soleni la 400-an datrevenon de la unuaj astronomiaj observoj fare de Galileo, dum 2009 la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj asocioj festos la “Internacian Jaron de Astronomio.” La celo estas vekigi intereson ĉirkaŭ la mondo pri scienco kaj pri la diversaj mirindaĵoj facile videblaj en la ĉielo.

Tiuspirite ni inaŭguras ĉi-numere novan, iom eksperimentan rubrikon pri diversaj ĉielaj aktualaĵoj videblaj el la norda duonsfero. Por ke ĉiuj povu partopreni, ni traktos aferojn videblajn per nur senhelpa okulo aŭ simpla binoklo.

Dum Februaro kaj Marto, ĉiuvespere en la okcidenta krepusko glacie radias la brila Venuso. Venuso estas aparte rimarkinda ĉar ĝi brilas pli hele ol ĉiuj aliaj astroj en la ĉielo (krom la luno kaj suno). Se vi zorgas serĉos la okcidentan ĉielon, vi povos eble trovi ĝin eĉ antaŭ la sunsubiro!

Ĉar ties orbito estas malpli larĝa ol la orbito de Tero, Venuso neniam vagas tro for de la suno en nia ĉielo. Kiam ĝi ne estas tute kaŝita en la suna brilego, ĝi aperas kiel “matena” aŭ “vespera” astro.

Kompreneble Venuso ne estas stelo, sed planedo. Ĝi tre similas al Tero laŭ grandeco kaj gravito, kaj pro tio oni foje nomas Teron kaj Venuson “ĝemeloj.” Tamen malgraŭ la simileco al Tero—kaj malgraŭ la ofta onidiro ke “virinoj venas de Venuso”—efektive Ve-



La sudokcidenta ĉielo, kiel ĝi aspektos ĉirkaŭ la 8-a aŭ 9-a vespere dum Februaro kaj Marto.

nuso tute ne taŭgas por homoj. La atmosfero, kiu konsistas plejparte el karbona dioksido, estas multe pli densa ol la nia. Ĉe la surfaco la atmosfera premo estas same forta kiel la premo de akvo je unu kilometro sub la maro. Kaj pro fortega forceja efiko, temperaturoj kutime atingas pli ol 400 °C. Do, bedaŭrinde, ajnaj homoj sur Venuso (aŭ inaj aŭ malinaj) estus rapide kaj ĝismorte premitaj kaj rostitaj...




Foto fare de la soveta sondilo *Venera 13*, unu el nur kelkaj esploroj kiuj sukcese atingis la surfacon de Venuso. La intensa atmosfera premo kaj varmegeo malfunkciigis la sondilon post nur 127 minutoj.

En la suda ĉielo staras la plej fama kaj rekonebla el la konstelacioj, konata per diversaj nomoj ekde prahistorio. Al ni, ĝi nomiĝas Oriono, la ĉasisto. Meze de Oriono, inter la blu-blanka Riĝelo en lia piedo kaj la oranĝ-ruĝa Betelĝuzo en lia ŝultro, troviĝas la tri steloj de lia “zono.” Tiun facile troveblan triopon ni utiligos kiel montrilon por trovi aliajn objektojn.

Sekvu la zonan maldekstren kaj vi trafos la plej helan stelon en la ĉielo: Siruson. Per observado de etaj osciloj en la moviĝo de Siruso, astronomoj en la 19-a jarcento malkovris ke ĝi havas etan orbitanton. Tiu malhela objekto, kiun ni nun nomas Siruso-B, estas efektive “blanka nano”: kolapsinta, densega kerno de mortinta stelo.

Nun sekvu la zonan de Oriono dekstren. Vi alvenos ĉe hela Aldebarano, la arde ruĝ-oranĝa okulo de la konstelacio Taŭro. Iru dekstren iom pli kaj vi atingos la Plejadojn,


La Plejadoj, fotitaj de la observatorio Palomar. La nebuleco ne videblas sen long-daŭra foto, sed eĉ binoklo montras mirindan stelamason.



unike kompaktan kaj allogan grupeton de steloj. La Plejadoj ne estas tiel helaj kiel Aldebarano aŭ Siruso, do se vi loĝas en loko kie poluas la ĉielon multe da artefarita lumo (ekz. apud urbego), vi eble bezonos helpon por trovi la Plejadojn (*vidu sube*).

Samkiel Oriono, la Plejadojn konis multaj popoloj laŭ diversaj nomoj. Laŭ la greka mitologio, ili estis la sep filinoj de Atlaso, la titano kiu apogis la mondon. Por la vikingoj, ili estis la kokinoj de la diino Freja. En la svahila lingvo ili nomiĝas *Kilimia*, nomo ligita al la sezono de kultivado. Kaj en la japana ili nomiĝas *Subaru*. (Kiam vi venontfoje vidos aŭton de la samnoma firmao, serĉu la stelojn en ĝia emblemo!)

Sub sufiĉe klara ĉielo, oni kalkulos almenaŭ ses stelojn el la Plejadoj per senhelpa okulo. Sed per binoklo oni malkaŝos veran juvelaron. Efektive, la Plejadoj estas stelamaso kun pli ol 500 membroj, ĉiuj naskiĝintaj el la sama hidrogen-nubego. Se vi havos ŝancon serĉi ilin, nepre provu! ★



Tenu la brakon rekte ĉielen; inter la etenditaj montr fingro kaj et fingro kuŝas proks. 12° de la ĉiela sfero—tio estas preskaŭ la sama angula distanco inter Aldebarano kaj la Plejadoj.

## Pri balotproponoj kaj reklamado

La raporto pri la Masaĉuseca manifestacio kontraŭ la Kalifornia balotpropono 8-a (*Usona Esperantisto* 2008/6, "loke", p. 4) estigas komentojn. Se mi ne eraras, Kalifornio aljuĝas la samajn rajtojn al samseksaj paroj kiel al geedzoj. Se la leĝo entenas esceptojn, oni povus protesti kontraŭ la esceptojn anstataŭ insisti ke tia kunigo nomiĝas geedzeco. Peti ke oni oficiale ŝanĝu la difinon de geedziĝo estas tute alia afero.

Decas klarigi ke en la Kristana religio geedziĝo staras kiel metaforo por la rilato inter Kristo kaj la Eklezio. En Johano oni legas, "Kiu havas la fianĉinon, tiu estas la fianĉo" (3:29). En Mateo, la tuta verso 9:15 tekstas jene: "Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu la filoj de la edziĝejo povas malĝoji, dum la fianĉo estas kun ili? Sed venos tagoj, kiam la fianĉo estos prenita for de ili, kaj tiam ili fastos." Aldone, troviĝas tiuj vortoj en Apokalipso: "Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio, pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo" (21:2).

Pro tio la geedziga Diservo de la Episkopala Eklezio, kiu komenciĝas per alparolo al la gefianĉoj, entenas ĉi tiujn vortojn pri geedzeco: "It signifies to us the mystery of the union between Christ and his Church" (1979 BCP, p. 423). Aldone, komenciĝas jene unu el du la preĝoj kiun la pastro povas elekti por beni la novan geedzan paron: "O God, you have so consecrated the covenant of marriage that in it is represented the spiritual unity between Christ and his Church" (p. 431).

Jen la unua strofo de fama himno (tradukita fare de Clarence BICKNELL el la angla) kantata de multaj kristanoj: "Sur Kristo sin apogas / la sankta eklezi'; / per akvo kaj la vorto kreita estas ŝi. / Por sia fianĉino li venis el ĉiel'; / Per sango ŝin aĉetis kaj sia mortsigel'" (*Adoru Kantante*, nro. 90).

Kiu ajn studis la bazojn de nia Okcidenta Civilizo komprenas ke ĝi devenas plejparte el la historie nomita Kristanlandaro. Respektindas la limo inter Ŝtato kaj Eklezio. Ĉu Ŝtato rajtas dekreti ŝanĝon en la difino de vorto kiu entenas religian signifon ekde la komenco de nia civilizo? Ĉu saĝas miksi pledon por tiu difinŝanĝo kun propagando por nia lingvo? Antaŭ kelkaj jardekoj esperanta librovendisto, post prelego pri Esperanto al grupo da viskonsinaj studentoj, distribuis la ruĝan libreton de Mao ZEDONG. Tio liveris la impreson ke Esperanto estas lingvo por komunistoj. Analogeco kun tiu masaĉuseca manifestacio estas neevitebla.

—Pierre L. ULLMAN, Milwaukee, WI

### **Skribu al *Usona Esperantisto*!**

Tiu ĉi paĝo estas loko por "parol-libereco" kie oni povas komenti pri E-USA kaj pri aferoj el pasintaj numeroj. Leteroj prefere estu ne pli ol 500 vortojn longaj; ni redaktos por laŭbezone koncizigi. Ni bonvenigas kontribuojn en Esperanto aŭ la angla. Skribante, nepre menciu ke via letero estas "por la bulteno."

*The letters page is a "free-speech zone" where you can comment on E-USA and on topics from previous issues. Letters should be no longer than 500 words each; we'll edit for length, as needed. Contributions may be in Esperanto or English. When writing, be sure to indicate that your comments are "for the newsletter."*



# Ĉe la redaktista skribotablo

Alvenis malmultaj provoj al nia lastfoja poezia defio. Poezio alportas novajn defiojn por la tradukanto—ne nur oni devas zorgi pri senco kaj tono, sed pri rimo kaj ritmo. Tamen malgraŭ obstakloj (kaj foje pro obstakloj) floras la poezio, eble en nia lingvo eĉ pli, ol en naciaj lingvoj.

Dankon al RW, GB, HF, kaj LM, kiuj alfrontis la taskon kaj sendis siajn tradukojn de “In Flanders Fields” (verkis John MCCRAE en 1915).

La proponita poemo havas jamban metrikon (neakcentita silabo sekvata de akcentita silabo; verso finiĝas per akcentita). Tradukonte poemon en Esperanton, oni devas decidi, ĉu sekvi la saman metrikon, kiel en la originalo, aŭ ĉu alpreni novan metrikon, kiu eble havas similan karakteron al la originalo sed estos pli “Esperanta”. Jamba metriko estas fremda al la Esperanta parolritmo, sed ĝi estas ofta en la poezio pro influo de aliaj poeziaj tradicioj. Tradukanto, kiu volas redoni la jamban metrikon de “In Flanders Fields” en Esperanto, havas malfacilan taskon, ĉar la reguloj de Esperanto permesas, ke la jamba verso finiĝu per pronomo, prepozicio, mallongigita substantivo, aŭ manpleno de aliaj vortetoj (*ĉi, ĉu, la*). El tiuj elektoj, elizado de substantivoj plej facilas, sed tio eblas nur ĉe nominativaj, singularaj substantivoj. Tial ni legas en la tradukoj, ke *Flanders fields* transformiĝas al *flandra kamp’* kaj *poppies* al *papavar’* aŭ simple *la papav-flor’*. Malgraŭ tiuj defioj, la tradukintoj elektis sekvi la ritmon de la originalo. Abundas en la tradukprovaj apostrofoj.

La poemo “In Flanders Fields” ankaŭ havas fiksitan rimoskemon, kiujn niaj



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko Lee kaj Tim prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ili faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi ne plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**

tradukantoj provis imiti. Feliĉe en Esperanto rimo estas pli facila—ĉe foje tro facila, pro ebleco aldoni sufiksojn kaj tiel krei rimojn. Niaj tradukintoj plejparte evitis “adasismon” (“la kutimo rimi per sukfiskoj, ekz. soifanta / militanta” —PIV 2005). Rimojn oni povas fari eĉ inter vortoj de malsamaj parolelementoj; ekzemplojn ni trovis en ĉiu provo: *batalkri’ / portu vi, apenaŭ for / ĝis aŭror’, batalu por / per forta kor’*. Rimado en Esperanto ne estas unukorda liro.

Pri specifaj vortoj kaj parolelturnoj:

**Flanders fields**—du elektis *flandra kamp’*, unu *flandria kamp’* (la “i” ne necesas laŭ PIV kaj krome malhelpas la ritmon), kaj unu elektis *flandra ter’* (kiu estas nemalplaĉa elekto pro tio, ke *ter’*, kiel *field*, estas multe pli mola vorto, ol *kamp’*.)

**poppies**—Por la fama floro ni trovis tri proponojn: *papavo, papaveto, kaj papav-flor’*,

kiuj diverse rolis pro la bezono de la strikta metriko.

**the crosses, row on row**—du rekte redonis la sencon per *inter la krucoj kaj ĉe lini' de krucoj*, aliaj refaris la bildon per *najbaro vice ĉe najbar'* kaj *tomb-kruca glor'*.

**amid the guns below**—*sube pafas regiment'* eble plej rekte alfrontas la originalon; ankaŭ menciigis *suba kanonbru'* kaj *pafhoror'*.

Por la mezaj strofoj, la tradukistoj sekvis tre malsamajn vojojn, eĉ nekompareblajn. La provo de LM estis la plej fidela al la originalo —*Mortinoj ni, apenaŭ for / Ni vivis, ĝuis, ĝis aŭror'*. RW parolis de la alia flanko—*Ni kuŝas mortaj en turment' / sen vid' de sun' en firmament', / sen am'*. Estis aparte plaĉa rekta kaj belsona provo de GB: *[ni] vivis kaj amis, sed nin vualas Flanda kamp'*.

**the torch**—HF elektis *standardo* anstataŭ *torĉo* kiel la aliaj, la simbolo eble samas.

**If ye break faith with us who die / We shall not sleep, though poppies grow**—Por la finaj strofoj plej plaĉas la frapa, klara propono de HF—*Decidos la fidelo ĉu / Ni pace dormos tie ĉi*. La aliaj tradukintoj menciis denove la papavojn, kiel la originala poemo, sed pro tiu elekto, la lastaj strofoj fariĝis iomete torditaj.

Estos malfacile fari nian kutiman “*pas-tiĉon*” de diversaj provoj, pro devo konservi la rimoskemon. Tial ni prezentos al vi la kvar tradukprovojn, kiujn ni ricevis. Kiu(j)n vi preferas?

Por la venonta defio, ni proponas tre aktualan tekston—la unuan parton de la poemo “*Praise Song for the Day*”, kiun verkis Elizabeth ALEXANDER kaj kiun ŝi deklamis ĉe la inaŭgura ceremonio de la nova usona prezidento, Barack OBAMA. Oni povas debati la kvaliton de la poemo mem,

sed ni opinias ĝin interesa tradukdefio. Ĉu la tasko estas pli facila aŭ malfacila, ol traduki “*In Flanders Fields*”?

Each day we go about our business,  
walking past each other, catching each other's  
eyes or not, about to speak or speaking.

All about us is noise. All about us is  
noise and bramble, thorn and din, each  
one of our ancestors on our tongues.

Someone is stitching up a hem, darning  
a hole in a uniform, patching a tire,  
repairing the things in need of repair.

Someone is trying to make music somewhere,  
with a pair of wooden spoons on an oil drum,  
with cello, boom box, harmonica, voice.

A woman and her son wait for the bus.

A farmer considers the changing sky.

A teacher says, *Take out your pencils. Begin.*

We encounter each other in words, words  
spiny or smooth, whispered or declaimed,  
words to consider, reconsider.

Kaj jen la tradukoj de “*In Flanders Fields*”:

## Denove, la originala poemo:

In Flanders fields the poppies blow  
Between the crosses, row on row,  
That mark our place; and in the sky  
The larks, still bravely singing, fly  
Scarce heard amid the guns below.

We are the Dead, Short days ago  
We lived, felt dawn, saw sunset glow,  
Loved, and were loved, and now we lie  
In Flanders fields.

Take up our quarrel with the foe:  
To you from failing hands we throw  
The torch; be yours to hold it high.  
If ye break faith with us who die  
We shall not sleep, though poppies grow  
In Flanders fields.

**Traduko № 1 (GB):**

En flandria kamp' papavoj ondas  
 Inter la krucoj, kiuj sondas  
 Tombojn niajn, kaj en ĉiel'  
 Alaŭdoj brave kantas, kiel  
 Flustro dum milit' kanonas.

Mortintoj, ni antaŭ nelong'  
 Vekiĝis kun tag' post nokta sonĝ'  
 Vivis kaj amis, sed nin vualas  
 Flandria kamp'.

Al la malamik' oponu!  
 Velkintaj ni—al vi l'ordono!  
 Levu vi la torĉon alta.  
 Se vi perfidos nin kiuj falas,  
 Ni maldormos, eĉ papavoj daŭras  
 En flandria kamp'.

**Traduko № 2 (LM):**

En Flandra kamp' la papav-flor'  
 Ventflirtas en tomb-kruca glor',  
 Jen nia lok'; kaj en ĉiel'  
 Alaŭda flug' kaj kant', kiel  
 Voĉeto super paf-horor'.

Mortintoj ni, apenaŭ for,  
 Ni vivis, ĝuis, ĝis aŭror',  
 Sed kuŝas nun post mort', tiel  
 En Flandra kamp'.

Vi, posteul', batalu por  
 La venk' de bon', per forta kor';  
 La torĉ' al vi, daŭru iel.  
 Ni mortus pro perfid' de cel',  
 Ne dormus; floru, papav-ĥor',  
 En Flandra kamp'.

**Traduko № 3 (HF):**

En flandra ter' kuŝadas ni,  
 sub papavetoj kaj lini'  
 de krucoj; kaj en supra blu',  
 kun spit' al suba kanonbru'  
 alaŭdoj kantas en defi'.

Ĵus tuŝis nin la sunradi',  
 ni sopiradis al patri';  
 sed nun ni kuŝos ĉiam plu  
 en flandra ter'.

Aŭdiĝu plu la batalkri':  
 standardon nian portu vi,  
 ĝin hisu en la ventoflu'.  
 Decidos la fidelo ĉu  
 ni pace dormos tie ĉi  
 en flandra ter'.

**Traduko № 4 (RW):**

En flandraj kampoj blovas vent'  
 papavojn tra la tombsilent',  
 najbaro vice ĉe najbar';  
 ankoraŭ kantas alaŭdar'  
 dum sube pafas regiment'.

Ni kuŝas mortaj en turment',  
 sen vid' de sun' en firmament',  
 sen am', ni kuŝas sur rempar'  
 en flandra kamp'.

Batalu daŭre kun prudent';  
 la torĉon ni kun velka sent'  
 transdonas. Ne perfidu ĉar  
 al mortaj ni sur papavar'  
 ne venus dorm', sed nur lament'  
 en flandra kamp'.

## Kial oni brosas per broso sed kombas per kombilo

In English we can say, "I brush my hair with a brush and comb my hair with a comb," which seems simple enough. So why is it that in Esperanto we say, "Mi brosas miajn harojn per broso kaj kombas miajn harojn per kombilo"?

One difference is that in Esperanto the word *haro* means a single hair, so we refer to brushing or combing our *harojn*, plural. This is logical, and it's similar to the way many other languages say it, but a literal translation sounds comical to native English speakers because we say "hairs" only in reference to hairs that are noticeably few and relatively far apart. (Yes, like the ones on the top of my head. Thanks for reminding me.) Someone learning Esperanto might be amused by this, but probably not confused.

The other difference is more puzzling. Why do we refer to the two hair care instruments in question as *brosoj kaj kombiloj*? Why not *brosoj kaj komboj*, or *brosiloj kaj kombiloj*? Why does one require the *-il* suffix and not the other?

We'd be inclined to ask a question like that of English (or most other languages) because we don't expect them to be logical or consistent. Hence it doesn't surprise us that we staple with a stapler but nail with a hammer. When someone points out that words with pronunciations as different as "laughter" and "daughter" differ only by the first letter, or that we speak of traveling "on" a plane when most of us actually have the good sense to travel *in* them, the person asking the question is probably a comedian (specifically Gallagher in the first instance and the late George Carlin in the second).



### D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

But we tend to expect better of Esperanto, so what's going on here?

The usual explanation, going back at least to Kalocsay and Waringhien's *Plena Gramatiko*, is that root words in Esperanto have an inherent part of speech. Some, like *bros-*, are fundamentally nouns. Others, like *komb-*, are fundamentally verbs. Still others, like *bel-*, are fundamentally adjectives.

This explanation isn't reassuring to someone learning the language. Having to learn whether a root is nominal, verbal, or adjectival sounds too much like memorizing noun gender in German or Latin or Russian. Fortunately in practice it's nowhere near the problem that the description implies, and just as with the notion of verb transitivity discussed last time, there's a way of looking at it that makes it seem far less forbidding. Before I get to that, though, let me say a little more about the traditional view, since it influences how Esperanto dictionaries are written.

Zamenhof's *Universala Vortaro* gave roots without endings, but in a modern Esperanto dictionary, the great majority of words have an ending attached that shows the "base" part of speech. The main entry for *bros-* has an *-o* on the end to show that it's a noun. The verb *brosi* is there as well, but usually as a derivation of the noun

*broso*, not a word in its own right. Similarly, *komb-* ends in *-i* to show that the root is inherently a verb, *bel-* has the *-a* ending of an adjective, and so on. Of course, roots such as *kaj*, *mi*, *hodiaŭ*, and the like that can stand on their own with no grammatical ending are shown without one.

(The usual convention in Esperanto dictionaries is to ignore grammatical endings when determining alphabetical order, which is why words sometimes seem to be out of place. For example, *franco* and *Francio* are usually given in that order rather than the other way around, because the final *-o* has no effect on the alphabetization. Students could be saved confusion if more textbooks and teachers took pains to point this out.)

When the root word is a verb, the corresponding noun is an action. So from the verbs *manĝi*, *kuri*, and *ŝoveli*, we get the nouns *manĝo* (a meal), *kuro* (a run), and *ŝovelo* (an act of shoveling). It follows that since *kombi* is a verb, *kombo* means the act of combing. So to identify a comb, we need a different noun, *kombilo*, and similarly we eat and shovel with *manĝiloj* and *ŝoveliloj*.

On the other hand, we don't need to say *martelilo* because *martelo* already means a hammer.

This suggests another way of looking at the question: It similarly clears things up when you understand the meaning of a noun. *Kombo* and *manĝo* are actions, so it isn't surprising to find them under *kombi* and *manĝi* in dictionaries. *Belo* and *justo* are abstract qualities, and dictionaries define the roots as adjectives. *Martelo* and *hundo* are things, and that's how they're treated, as nouns.

As discussed last time, whether a verb is transitive or intransitive isn't something

you have to memorize like gender in French or Spanish. If you really understand the meaning of the verb, it's obvious. Similarly, if you really know what a root word in Esperanto means, it's clear whether it's "verbal" (an action), "adjectival" (a quality), or "nominal" (a thing).

This isn't to say the standard grammatical explanations are incorrect, only that they can make the grammar seem harder than it really is. In fact, students who've never heard the traditional explanation are probably less confused than the ones who have!

Of course, whether a student has had it explained or not, the *broso-kombilo* distinction may still seem unnecessarily difficult. Why not, say, just have *broso* mean the action of brushing? Then it would work just like *kombo*, and the objects would be *brosilo* and *kombilo*. Or why not make *kombo* the name of the instrument, in parallel with *broso*?

Well, that's a possibility, but there are actually good reasons the words work in Esperanto the way they do. What really defines a brush (in English as well as Esperanto) is what it is, not how it's used. Paint brushes, hair brushes, tooth brushes, and so on are the same kind of thing although used in pretty different ways. Combing, on the other hand, is basically an action that combs are designed to perform. Even if you might want to quibble with this, it's simply not a big enough problem in practice to worry about.

In fact, the general lesson to take away from all of this might be that grammatical theory tends to be harder than grammatical practice. Teachers of Esperanto, at least at the level of courses for *komencantoj* and *progresintoj*, should take care not to explain matters in a way that confuses more than enlightens. ★

## ESPERANTO-USA's CORRESPONDENCE COURSES

### Perkorespondaj Esperanto-Kursoj (PEK)

*Are you without access to a computer? Not comfortable surfing the web?*

*Would you like an opportunity to learn and/or improve your Esperanto at your own pace, with a private tutor?*

**Enroll in one of our correspondence courses!** They are available in *four levels* (you decide which one is best for you), and there is *no time limit*. Levels One and Two emphasize the development of everyday conversational skills:

**LEVEL ONE:** Using the textbook and CDs for the popular *Jen Nia Mondo 1* course, this twelve-lesson course will guide you to mastery of basic Esperanto.

COURSE MATERIALS: Workbook (32 pages), *Jen Nia Mondo 1* book (66 pages), and 3 *Jen Nia Mondo 1* CDs. **Course fee: \$63** (If you already have the book, deduct \$14.80. If you have the 3 CDs, deduct \$24.60.)

**LEVEL TWO:** This thirteen-lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in its own right, and is recommended for the serious student as a follow-up to Level One.

COURSE MATERIALS: Workbook (53 pages), *Jen Nia Mondo 2* book (89 pages), 3 *Jen Nia Mondo II* CDs. **Course fee: \$63** (If you already have the book, deduct \$11.30. If you have the 3 CDs, deduct \$24.80)

**LEVELS THREE AND FOUR,** both conducted primarily in Esperanto, use Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, which is not only an advanced textbook but also a guide to the Esperanto movement and culture. Each chapter contains several short readings from Esperanto literature, footnotes, illustrations, and questions. Students who wish to improve their speaking and listening skills are encouraged to ask their instructor to suggest ways to practice these skills. **Course fee: \$73.75 each.** (If you already have the book, deduct \$31.75.)

---

## ESPERANTO-USA CORRESPONDENCE COURSE REGISTRATION FORM

Please return this form to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_ Date: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_  
City State Zip code

Telephone/Fax: \_\_\_\_\_ E-mail: \_\_\_\_\_

Please enroll me in the correspondence course checked below. I am enclosing \$ \_\_\_\_\_  
(Make checks payable to "Esperanto-USA")

Credit-card number: \_\_\_\_\_ Expiration date: \_\_\_\_\_

LEVEL ONE     LEVEL TWO     LEVEL THREE     LEVEL FOUR




## Rekte, kuraĝe, elegante!

Recenzo de Mikaelo BRONŝTEJN

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkigis ke (a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni; kaj (b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro “Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto”, tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, traleginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

La vivo de Lidia ZAMENHOF, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona—sendube meritita detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy HELLER, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia ZAMENHOF nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto—kaj de la lingvo, kaj de la mo-



*Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto.*  
Wendy HELLER. Tradukis B. WESTERHOFF.

(FEL. Antverpeno. 2007. 398 paĝoj. Prezo: 27.60 €)

Aŭtoritata biografio pri la filino de la iniciatinto de Esperanto. Havebla ĉe FEL <<http://esperanto.be>> kaj UEA <<http://uea.org>>.

vado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve—nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard WESTERHOFF kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.

De jaro al jaro la vivobildo de Lidia ZAMENHOF estas fideinde disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonisto kaj ne malpli abunde—diraĵoj

de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturaj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj—por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la parenca kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

“Ĉar ne eblas kompreni (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia.” Kun tiu opinio Wendy HELLER enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: “La doktoro kaj la reva”, “Esperanto” kaj “La Interna Ideo”. Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj—jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indifera por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Ĉemetoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudekunua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia

rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombigitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj—ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj—ne nur en la nazia Germanujo, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy HELLER donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum mavaĵ vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidas deporti ĉiujn polaj judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanujo, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereo prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron—ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la

inviton por Lidia—pro antaŭvidataj komplikajoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia—lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn...

“Se mi forlasis Amerikon—skribis ŝi al franca korespondanto—eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco—sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari.”

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan faktan, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy HELLER. La Gardanto, Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas

konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn—pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

La traduko legeblas senpene, ĝuinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVe uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: “Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ kiel pilgrimadon”. (p. 59) “Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia aparato, respektive tradukanto kaj du aliaj esperantistoj. (p. 199) “Lidia iris hejmen al Varsovio dum kelkaj semajnoj...” (p. 232). Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard WESTERHOFF meritas sinceran dankon. ★

## Esperanto-Vojaĝoj

*Ĝuu vojaĝon dum la 150-a jubilea jaro de la naskiĝo de Zamenhof...*

### Kongreso de Esperanto-USA St. Louis, MO—22–25 Majo

Temo: *Kiel Varbi Novan Generacion*. Estraro renkontiĝos la tutan tagon, vendredon la 22-an. <http://esperanto-usa.org>

### Nord-Amerika Somera Kursaro San Diego, CA—29 Junio–17 Julio

La plej bonaj Esperanto-kursoj en la mondo! 40-a jaro de NASK! Pasigu tri semajnojn en Esperantujo ĉe la fama apudmara Universitato de Kalifornio ĉe San-Diego (UCSD). Kontaktu

s-inon Ellen EDDY <eddyellen@aol.com> aŭ vizitu la TTT-ejon: <http://esperanto.org/nask>

### 94-a Universala Kongreso Bjalistoko—25 Julio–1 Aŭgusto

En la naskiĝurbo de kreinto Ludoviko L. ZAMENHOF. Esperanto Vojaĝ-Servo nun havas detalojn pri eblaj flugoj kaj ekskursoj kaj antaŭ kaj post la UK. Ni ankaŭ havas hotelo-eblojn. Estas rekomendinda kiel eble plej baldaŭ kontaktu nin por helpo:

#### Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue

Berkeley CA 94709

Tel.: 510-531-8393

<LusiHarmon@AOL.com>

## Ago-Semajno: Novjaro en Slovakujo

Mi loĝas kun mia fianĉino Anna en Vroclavo, Polujo ekde 3 jaroj, kio donas multajn oportunojn viziti Esperantajn aranĝojn en diversaj eŭropaj landoj, kaj ili estas kutime pli plaĉe internaciaj ol Esperantaj aranĝoj en Usono. Ĉiam okazas pluraj novjaraj kunvenoj, ekzemple IS (Internacia Seminario, longtradicia junulara germana evento, kiu daŭras semajnon). Tiaj eventoj estas gaje amuzaj, kun Esperantaj koncertoj nokte kaj diversaj prezentoj, prelegoj, kaj ekskursoj tage. Antaŭ kelkaj jaroj aperis nova tia novjara junulara evento en Polujo, nomata AS (Ago-Semajno). Antaŭ jaro, ni partoprenis tion en Malborko. Ĉi-jare ĝi okazis unuan fojon ekster Polujo, en montara urbo Liptovský Mikuláš en apuda Slovakujo, kaj kunaranĝis ĝin la pola teamo kaj lokaj slovakaj Esperantistoj. Ni iris duan fojon al Ago-Semajno, kaj tre ĝuis ĝin.

### Kiu venis?

Preskaŭ 200 homoj aliĝis, ĉefe poloj kaj slovakoj, sed ankaŭ multaj rusoj venis, kaj francoj, aŭstroj, germanoj, kaj multe pli. Plejmulto estis junuloj, sed ankaŭ venis mezaĝuloj, familioj kun infanoj, kaj maljunuloj. Kelkaj sufiĉe famaj homoj partoprenis. Ekzemple partoprenis Stano MARČEK, redaktoro de la UEA-revuo “Esperanto” kaj aŭtoro de nova serio de Esperantaj instrulibrooj. Peter BALÁŽ, tre aktiva Esperantisto (kun E@I—Esperanto ĉe Interreto, propra eldonejo Espero, ktp) faris multan kunvenan laboron kaj prezentis pri bonaj metodoj informi ne-Esperantan publikon pri nia lingvo. Tiaj eventoj ankaŭ estas oportuno revidi diversajn amikojn de pasintaj

### Russ WILLIAMS

Antaŭe de Aŭstino, Teksaso, Russ nun loĝas en Vroclavo, Polujo kun sia fianĉino Anna SKUDLARSKA. Ili esperantumas kaj tabulludas obsede.

[cxiomortas@gmail.com](mailto:cxiomortas@gmail.com)



eventoj. Krome, tre plaĉe por ni, venis multaj bonegaj bandoj—vidu sube.

### Kia estas tia kunveno?

Homo, kiu ankoraŭ ne partoprenis tian Esperantan eventon, eble scivolos pri konkretaj detaloj. AS okazis en lernejo kaj junulara gastejo. Eblis mendi propran dormĉambbron, aŭ dormi malmultekoste en la amasloĝejo, ĉi-kaze sur la planko de la lerneja sporthalo. Ekde mia partopreno en eŭropaj eventoj, mi konstatis, ke usonaj eventoj pli kostas kaj ne ofertas tiajn malmultekostajn loĝopciojn. Parte pro tio, mi opinias ke eŭropaj eventoj pli sukcese allogas junulojn, kiu ofte ne povas pagi iom luksan hotelĉambbron, kiel kutimas en usonaj kunvenoj. (Ne nur Esperantaj, sed ĝenerale—ekzemple tabulludaj kunvenoj. La eŭropa go-kongreso ankaŭ ofertis amasloĝejon kiam mi iris tien en Aŭstrujo en 2007, dum la usona go-kongreso neniam faras tion laŭ mia scio, preferante relative kostajn hotelojn kun propraj necesejoj, ktp.)

Amasloĝejo havas plaĉan kromefikon, ke en granda halo vi ekkonas multajn aliajn homojn apud vi, kaj estas aŭtomataj oportunoj por konversacioj.

En tiaj eventoj estas manĝoservo, pri kio homoj kutime plendas en tiaj eventoj, do (kiel vegano) mi kutime memzorgas kaj simple aĉetas propran manĝon en apudaj butikoj aŭ restoracioj.

Ĉi-jare, la aranĝo de konstruaĵoj sufiĉe plaĉis—la gastejo kaj lernejo apudis unu la alian, kaj 10 minutojn for estis la urbocentro, kun la koncertejoj kaj manĝbutikoj, ktp. En lernejo ĉefe okazis la dumtaga programo, kun diversaj prelegoj, lecionoj (inkluzive rektametodaj kursoj por komencantaj Esperantistoj), ktp. Ni partoprenis plurtagan bonan trejnadon pri Esperanta instruado, kadre de programo “Flugiloj de malfacila vento”, prezentata en diversaj tiaj kunvenoj lastatempe. Aliaj klerigaj interesaj prezentoj, kiujn mi ĝuis, inkluzivis lingvosciencan prelegon pri la origino de lingvoj kaj teĥnikan enkondukon pri la programlingvo Erlang.

Alia amuzo iom tradicia evento estas la aligatorejo. Verŝajne ĉiuj scias ke krokodilo estas Esperantisto, kiu maltaŭge parolas sian denaskan lingvon inter aliaj Esperantis-



Xosé CONDE de Katalunujo bruligas tradician magian punĉon el alkoholo kaj kafo dum nacia vespero.

toj, kiuj ne komprenas ĝin kaj preferas paroli en Esperanto. Aligatorejo estas Esperantisto, kiu parolas nek en Esperanto nek en sia denaska lingvo, sed en alia lingvo. En la aligatorejo, oni rajtas (eĉ devas) aligatori. Ekzemple dum la AS-aligatorejo, mi kaj litovino kunparolis pole; tiam mi paroletaĉis germane kun aŭstro, kiu respondis al mi angle; ktp. Aligatorejo ĉiam amuzas min.

Ankaŭ plaĉis la bona libroservo, kun kelkaj longaj tabloj kovritaj per libroj aĉetebloj. Mi aĉetis diversajn faklibrojn pri Esperantaj literaturo, kulturo, terminologio, ktp. Anna ĝoje aĉetis “Morto de artisto”, la nova dika romano de Anna LÖWENSTEIN; temas pri historia fikcio pri la roma imperio, kaj ĝi sekvas ŝian antaŭan sukcesan samteman romanon “La ŝtona urbo”. Anna jam finlegis ĝin kaj tre ĝuis ĝin. Dume, mi jam legis (malpli longan) nefikcian libron, “Eŭropa ideologo” de Zlatko TIŠLJAR. Estas tre bona pensiga esejo pri kial la EU bezonas komunan identecon per lingvo nenacia (neangla) por sukcese pludaŭri.

Kiel kutime dum tiaj semajnoj, okazis diversaj ekskursoj en la regiono, kun Esperantaj ĉiĉeronoj. Ni iris al la urba muzeo de natura historio, ĉefe pri mineraloj kaj plantoj kaj bestoj de la loka regiono, kio estis sufiĉe interesa. Kelkajn aliajn eksterajn ekskursojn, ekzemple montgrimpadon, ni preterlasis pro la tro malvarma por ni vetero.

Kiel kutime, ni portis kelkajn tabulludojn por ludi kun homoj. La organizintoj ankaŭ disponigis plurajn ludojn (ŝakon, domenon, Jenga, ktp) en komuna ejo, kaj okazis sufiĉe multa tabulludado dum la semajno.

Ĉiunokte okazis babilado, drinkado, ktp. Oni disponigis senpagan teon, kafon, ktp. Krome estis tablotenis, kio popularis.

Kelkfoje prezentiĝis Esperantaj teatraĵoj, mezepokaj dancoj, ktp. Plaĉis al mi spekti teatran version de novelo de Anton ČEĤOV, kiun mi koincide legis en Esperanto antaŭ kelkaj monatoj!

Nekutima kaj plaĉa afero estis komputilejo kun interreta aliro kaj ĉirkaŭ 10 komputiloj en la lernejo—sufiĉe ofte oni permesis al ni uzi la komputilojn por kontroli retpoŝton aŭ (miakaze) verki tekston por konkurso...

Kia konkurso? Komence de la semajno, oni anoncis, ke verkemuloj kreu tekston en kiu ĉiu vorto komenciĝas per la sama litero (laŭ via elekto). La lastan nokton, homoj prezentu siajn tekstojn, dum konerta paŭzo. Mi elektis la literon “m”. Eble 8 aŭ 10 homoj verkis kaj deklamis kaj amuzis la aŭskultantaron kaj tri juĝistojn. Finfine mi gajnis duan lokon kaj ricevis kelkajn afablajn premiojn rezulte.

## Muziko

Granda allogo por ni al tiaj kunvenoj estas koncertoj, do mi pli detale priskribos la buntan muzikan prezentaron, kiun ni ĝuis dum la semajno. La eblo ĝui tiom multajn diversajn kaj bonegajn Esperantajn koncertojn (rokajn, bardajn, eĉ hiphopajn) estas vere inda kialo ĉeesti tiajn kunvenojn.

En Septembro ravis nin la nova al ni (sed efektive ne nova) sveda bando Perdita Generacio dum pola kunveno Arkones, kaj ilia ĉeesto en AS decidigis nin elekti AS ĉi-jare. Tre dancebla kaj malfacile klasifikebla rokmuziko, miksaĵo de rokaj kaj popolaj kaj humure eksperimentaj stiloj. Krom tradiciaj rokinstrumentoj, centre rolas melodiko (blova piana klavaro, kun tubo inter instrumento kaj buŝo). La kantotekstoj ofte surrealas, fojfoje amuzas, fojfoje kortuŝas.

Fama franca poligloto JoMo ofte ĉeestas



Dolĉamar “senelektre” (Foto de IVO MIESEN)

tiajn eventojn, verŝajne turneante al pluraj novjaraj eventoj. Bonŝance li venis al AS kaj koncertis vigle kiel kutime unu vesperon, dancigante nin. Li ĉiam kantas kaj gitaras sole, kaj lastatempe li ekeksperimentas kun elektronikaj efikoj por akompani sin per propra fona ritmo, kiu amuzas kaj novas.

Longtempa pola bardo Georgo HANDZLIK koncertis, kaj ni tre ĝuis liajn pli trankvilajn kaj spritajn kantojn, fojfoje amuze maldecajn (unu kanto konsistas nur el amuzaj maldecaj fiinsultoj, konkludante laŭ mia memoro “kun tia stoko vorta, ĉu Esperanto estas morta?”), fojfoje kortuŝe sentimentalajn (“mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko”). Plaĉas krome, ke lia kantado ĉiam tre klaras kaj trankvilas.

El Finnlando venis tre konata kaj populara rokbanda Dolĉamar, ĉiam estrata de Patrick AUSTIN kun daŭre novaj bandanoj, fojfoje ankaŭ Esperantistoj. Lia iom nova furora kanto “Junaj idealistoj” vere brilas kaj ravas min ĉiufoje. Dum AS mi bonŝancis aŭdi ĝin dufoje diversstile, ĉar Dolĉamar ankaŭ koncertumis “senelektre”, plaĉa alternativa pli milda stilo por tiu bando.

Nova Esperanta hiphopa bando (verŝajne la unua tia) Pafklik el Francujo koncertis. Estas amuze aŭdi hiphopan



muzikon en Esperanto, kvankam mi konfesu, ke la kantado ofte malklaris dum la viva koncerto—poste ni havis okazon aŭskulti ilian debutan diskon, kaj la kantado efektive ŝajnis ege pli klara, kaj la tekstoj ofte ŝajnis spritaj. Ili akompanis Dolĉamar-on dum ties fama hiphopa kanto “Ĉu vi pretas?”

Juna rusa gitaristo kaj kantisto Elena MELNIKOVA (filino de aŭtoro Aleksandro MELNIKOV) koncertis, sed pro longa novjara festado la antaŭan nokton, ne povis kanti, bedaŭrinde! Tamen ŝi bele gitaris akompanite de flutisto.

Krome kiel kutimas en tiaj aranĝoj okazis nacia vespero, en kiu diversaj homoj prezentis. Plej memorindaj tiaj estis belegaj pianumado kaj kantado de franco Gijom, kaj aŭdaca jodla kantado de tradiciaj aŭstraj lernejoj kantoj de aŭstro Guna.

Certe mi forgesis menci iujn muzikaĵojn kaj aliajn bonaĵojn de la semajno, sed jen baza impreso de la afero. Por muzikŝatantoj, la semajno estis tre ĝuinda!

## JES!

Lastatempe okazis diskutoj kaj debatoj, ĉu IS kaj AS konkuras unu kontraŭ la alia, ĉu AS delogas homojn for de IS, tiel ke amikoj, kiuj antaŭe ĉiam vidis unu la alian dum IS, nun maltrafas unu la alian ĉar iuj ĉeestas AS. Nu, tiu problemo ne plu ekzistos, ĉar la gvidantoj de la aranĝoj interkonsentis kunigi la aferojn, kaj en decembro 2009 okazas nova kombinita kunveno JES (Junulara E-Semajno), ĉi-jare en Zakopano, Polujo, sed poste en aliaj landoj. Tio verŝajne allogas pli grandan kvanton de homoj ol IS aŭ AS individue. Se vi pripensas partopreni eŭropan novjaran eventon, jen bona ŝanco! Mi kuraĝigas tian vojaĝon. ★

## Jen la “m-teksto”, kiun verkis Russ:

Modeste mi montras mian mo-miksajon. Mia misio manskribi multe, metante “m”, meditis min. Minimume mi memoru mian moton: mo-umu!

Mi manskribis manie. Mi movis, manovris, malkovris, masakris, misatakis, miksitis, markis, makulis, muelis, martelis, mezuris, metaforis, mont-Parnasumis, Mors-kodumis, misgramatikumis misege.

Multaj momentoj malaperis.  
Multaj minutoj malaperis.  
Multaj matenoj malaperis,  
Multaj monatoj...  
Malvere—mi misparolas, mi mensogas!

Mia manuskripto maturiĝis. Misaŝoj marŝis malproksimen. Malplaĉaj malglataĵoj mildiĝis, moliĝis. Malgraŭ mia maldiligenta mispensa mezkompetenteco, mi mem manskribis mane malaĉan manuskripton montrantan multajn mo-vortojn.

Malgraŭ mia malmagra mo-komenco, mankis matematika multiplika metodo. Momentojn malantaŭe, mi memoris mal-vortojn.

Memkompreneble multegas multaj magiaj mirindaj mojosaj mal-vortoj malfiniĝantaj mo-e. Mal-vorta magazeno maletas! Mi malhonte malevitis multajn maltaŭgajn maljustajn mal-vortojn. Mal-vortoj malmankas malmalvere!

Mokemaj malsaĝuloj memoru:  
Mo-vortoj mojosas!  
Mal-vortoj malaĉas!

Kiel kutime, ni lotumos unu premion inter la solvintoj: \$10 da rabato ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 25-a de Marto.** Bonan solvadon!

## Horizontale

- |  |  |   |   |
|--|--|---|---|
| 1 Diserv' katolika                             | 17 "Sen ____o ne venas oro."                       | lignopeco; post <i>b-</i> , ĝi fariĝas urba insekto | 38 Ofta ekkrio en la <i>Plaza de Toros</i>      |
| 4 Kapabl', fort'                               | 19 lama  | 30 Sukersolvaĵo, foje acera                         | 39 Ŝafharar'                                    |
| 9 Alta ŝu', aparte utila dumvintre             | ELNA-prezidanto HARLOW                             | 32 Eŭropa ____o (politika asocio)                   | 40 "Al la buŝo de ____neniu povas ordoni."      |
| 12 Daŭre                                       | 20 Viva plezur' en animo                           | 34 Globforma pec'                                   | 41 Ĉirkaŭo de la homa korpo ĉe nivelo de koksoj |
| 13 Po-kvanta manĝaĵo                           | 21 "Vulpo mienon ŝanĝas, sed ____kokidojn manĝas." | 35 Pingloarb', ofte vidita kristnaske               | 43 L-sekvaĵo                                    |
| 14 "Trafi du celojn per ____ŝtono."            | 24 Paŝi, veturi, galopi aŭ flugi                   | 36 Riskos monsumon en ludo                          | 45 Korneca elkreskaĵ', ofte lakita              |
| 15 Grava datreveno, ofte cent- aŭ kvindek-jara | 26 Longa, mallarĝa kaj maldika                     |   | 47 Ili ŝirmas la koron                          |

1	2	3		4 @	5	6	7	8		9	10	11
12				13 @						14		
15			16					17	18			
			19				20					
21	22	23			24	25			26	27	28	29
30				31 @		32			33		34	
35				36	37					38		
39				40				41	42			
43			44		45		46		47		@	
			48	49			50	51				
52	53	54				55				56	57	58
59				60 @	61					62		
63 @				64						65		

- 48 Ŝi + li, ekzemple
- 50 "Kiu \_\_\_\_as kun koto, malpurigas la manojn."
- 52 Serĉe renkonti
- 55 Nomo de la simbolo kiu anstataŭas du literojn tra tiu ĉi enigmo
- 59 Sufikso rilate al doktrino aŭ kutima ago
- 60 Glatiga, briliga frotado
- 62 Grava org. en Roterdamo
- 63 Saketo aldukrita al vestaĵo
- 64 Jokohaman'
- 65 Defendata asert', ofte scienca

**Vertikale**

- |  |   |  |
|--|---|--|
| 1 Monat' de la Landa Kongreso de E-USA, 2009       | 29 Grasaj fluaĵoj   | 51 Land' kie okazis la UK en 1910              |
| 2 Retadresa finaĵo                                 | 31 "Sen ____, kolero estas ridinda afero."                    | 52 Ideala modelo                               |
| 3 Gras' animala                                    | 33 Sufikso rilate al subtenanto aŭ profesiulo                 | 53 P-sekvaĵo                                   |
| 4 Etno, socio                                      | 37 Malplezuri pro senintereso                                 | 54 Palindroma mezurunuo elektra                |
| 5 Pene tiri  | 42 Brulegi; fervori   | 55 Infana ludil', kutime homforma              |
| 6 Trajto; (aŭ) Itala verkisto Umberto              | 44 Nomo de la librego, kiun enmane tenas Lee MILLER ĉi-numere | 56 "Senĉesa ____o eĉ ŝtonon traboras."         |
| 7 Ŝi + mi, ekzemple                                | 46 "Kiu mem sin ____, malbone odoras."                        | 57 Maljese                                     |
| 8 Malnova, mallonga mezurunuo, ofte uzata en Usono | 49 Por malridemuloj, ili kaŝas la dentojn                     | 58 Malseka lok' meze de dezerto, ekzemple      |
| 9 Petola knabet'                                   |   | 61 Dua plej granda urbo en 51 vertikale (mll.) |
| 10 Frakcio en la formo 1/...                       | 21 Religia himn' hebrea                                       |  |
|  | 22 Orient-mediteranea ŝtat'                                   |  |
|  | 23 Renoprodukto   |  |
|  | 25 Longa, konstanta kutim'                                    |  |
|  | 27 Jure nuligi  |  |
|  | 28 Bela, ornama vegetaĵo                                      |  |

Nekutime multaj solvoj venis al la redakcio lastatempe. Ĉu pro manko de someraj distraĵoj? Ĉu vi fariĝis pli ludemaj? Aŭ ĉu kulpas la vetero? Nu, almenaŭ ĉe la redakcio (en okcidenta Novjorkio) ĉio jam ĝisfunde frostiĝis. Eĉ pli frosta, ŝajne, estas la Nordokcidento, el kie venis bela karto de s-ino Olga DU TEMPLE en Vankuvero. Ŝi afable skribis:

*La krucenigmo estis taŭga distraĵo dum la nekutimaj decembraĵoj: Dika du-futa neĝtavolo kovras ĉion. Dum la lastaj du semajnoj kondiĉoj sur la lokaj ŝoseoj estis danĝeraj, kaj sekve la —alie regula— liverado de ĵurnaloj ne okazis. Tial mankis al mi la ĉiutaga dozo de unu ĵurnala krucenigmo. Feliĉe, mi trovis la vian, kaj tio portempe savis min de nerva kolapso.*


Dankon pro la kuraĝigaj vortoj, Olga, kaj ni esperas, ke eĉ pli sanigos vin la ĉi-monata enigmo. Restu varme!

**Solvo de la enigmo en numero 2008/6**

Ĉ	E	F		P	L	A	Ĉ	I		M	A	P				
I	L	O		R	O	M	A	N		E	B	L				
E	N	S	I	A	K	O	R	T	O	Ĉ	I	U				
L	A	I	K	A			M	E	V							
			2	S	V	E	D		2	S	A	B	A	T		
L	U	M	O		L	I	F	T		3	I	L	I			
U	Z	O		L	I	L	I	O		3	L	I	N			
S	I	N		O	R	E	L			F	L	A	T			
I	N	D	I	K		M	I	R	I							
				4	D	U	S			4	I	N	K	U	4	J
K	O	K	E	S	T	A	S	F	O	R	T	A				
A	R	O		T	I	G	R	O		5	A	E	R			
F	O	T		O	P	I	O	J			D	R	O			

Gajnis la lotumadon **Arlyn KERR**. Gratulojn ankaŭ al niaj aliaj solvintoj: George BAKER, Brian Neil BURG, Olga DU TEMPLE, Ellen EDDY, Keneĉjo GOLDBERGO, Lucas GRAVES, Bill HARMON, Kevin HAULK, E. James LIEBERMAN, Peter MCCORQUODALE, Amanda Higley SCHMIDT kaj Russ WILLIAMS!

# Novaj varoj ĉe la libroservo




## **NATURAJ VORTORDOJ EN ESPERANTO** **Wim JANSEN**

Resumo pri analizo de modernaj tekstoj kaj pri eksperimentaj laboroj, kies temo estas la aŭtonomeco kaj natureco de vortord-strukturoj en nia lingvo. Wim

JANSEN estas inĝeniero kaj magistro pri kompara lingvistiko kun specialiĝo pri la eŭska lingvo. Li doktoriĝis pri teoria lingvistiko per disertacio pri la vortordo de Esperanto. 2008. 40p. 210x145. Papera. Nederlando.

**\$7.30**



## **MANLIBRO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO**

**K. KOVÁTS kaj aliaj**

La Manlibro kreiĝis kadre de "Flugiloj de Malfacila Vento," projekto por plivastigi kaj subteni inter la junuloj instruadon de Esperanto. La

celoj estis: plibonigi organizadon kaj gvidadon de Esperanto-kursoj per trejnseminarioj, altigi la lingvonivelon de junaj Esperanto-parolantoj per perfektigaj kursoj kaj ekzamenoj, iom post iom grandigi la nombron de junaj Esperanto-parolantoj per kursoj. La materialon oni pretigis ĉefe por junaj instruantoj kaj instruemuloj de Esperanto, kiuj volas spertiĝi pri tiu fako kaj legi pri ĝi esperantlingvajn artikolojn. Tre utilas la eldonajo ankaŭ por spertaj instruistoj, kiuj ŝatus havi bonan superrigardon pri la metodologio, informiĝi pri praktikaj demandoj,

kiuj rilatas al la plej aktualaj kaj modernaj Esperanto-helpiloj. Krom la teoria parto kaj historia trarigardo pri metodoj oni publikigas ankaŭ dokumentojn, modelojn por instruplano kaj priskribon de modela leciono, kaj ankaŭ diversajn listojn kun utilaj informoj.

2005. 150p. 205x140. Papera. Nederlando.

**\$15.30**



## **INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA**

Gvidilo kiu helpas al la kandidato prepari sin por ekzameniĝo. Centoj da esperantistoj jam ekzameniĝis je elementa aŭ meza nivelo. Atestilo de la du plej prestiĝaj internaciaj

Esperanto-organizoj estas premio pro bona lernado kaj instigo por plua progreso. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj.

2008. 39p. 210x140. Papera. Nederlando.

**\$7.50**



## **TUJ APUDE** **Humphrey TONKIN**

Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. La aŭtoro, d-ro Humphrey TONKIN estas ege bonkonata gravulo en la Esperanta mondo. Dum multaj jaroj li laboris ĉe UEA kiel prezidanto kaj estrarano.

2008. 56p. 200x110. Papera. Nederlando.

**\$12.40**

---

All books listed can be ordered: by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; by telephone at (510) 653-0998; by fax from (510) 653-1468; or through our website at **esperanto-usa.org**. For phone, fax or website orders, be sure to include a credit-card number. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged when the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.